

La plibonigo de la Kalendaro

Projekto de S^{ro} L. Cogen, Gento Belgujo (Marto 1916^a)
(Kunfando de la projektoj Armelin, Grosclaude kaj Baar)

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27	28	29	30	31	
I	Januaro	V	S	D	L	m	M	J	V	S	D	L	m	M	J	V	S	D	L	m	M	J	V	S	D	L	m	M	J	V	S	D
	Februaro	L	m	M	J	V	S	D	L	m	M	J	V	S	D	L	m	M	J	V	S	D	L	m	M	J	V	S	D	L	m	
	Marto	M	J	V	S	D	L	m	M	J	V	S	D	L	m	M	J	V	S	D	L	m	M	J	V	S	D	L	m	M	J	
Pasko																																
II	Aprilo			D								D																				D
	Majo																															
	Junio																															
III	Julio																															
	Aŭgusto																															
	Septembro																															
IV	Oktobro																															
	Novembro																															
	Decembro																															

Festo de la laboro

La projekto de S^{ro} L. Cogen, nuntempe pacjuĝisto en Ninovo, Belgujo, apartenas al la grupo de sistemoj kiuj dividas la jaron en kvar monattrioj 91 tagaj (la 365^a jartago kaj la « supertago » staras ekstersemajne); tiuj monattrioj estas dividitaj en unu monato de 31 tagoj kaj du monatoj de 30 tagoj.

Ĝi realigas, *sen ia escepto*, ĈIUJN kondiĉojn postulitajn de la internacia kongreso por la plibonigo de la kalendaro, okazinta je la fino de Majo 1914^a en Liĝo.

Tiuj kondiĉoj estas la jenaj:

1^o) Monattrioj formitaj per du monatoj de 30 tagoj kaj unu de 31 tagoj; konservo de la septaga semajno kaj de la religiaj kaj civilaj festotagoj kaj de la 1^a de januaro kiel tago de la jarrekomeno, (sen ke tiu tago devu esti festotago);

2^o) Fiksado de la Paska festo je la 2^a dimanĉo de aprilo, kiu devas prefere koincidi kun la 10^a de tiu monato;

3^o) Senmovigo de la semajno en la jaro per la uzo de unu tago « ekster-semajna », la ordinariajn jarojn, kaj de du tiaj tagoj, la superjarojn;

4^o) Fiksado de la religiaj kaj civilaj festotagoj (kiel eble plej), senpere aŭtaŭ aŭ malantaŭ dimanĉo;

5^o) Egaleco de daŭro de la monatosoj, monatotrioj kaj monatoj;

6^o) La 1^a, la 15^a kaj la 30^a de monato ne devas koincidi kun dimanĉo;

7^o) Sufiĉa nombro de labortagoj estas necesa je l'fino de l'jaro.

Tiuj diversaj postuloj estas realigitaj NUR PARTE en ĉiu el la sistemoj Armelin, Grosclaude kaj Baar, izolite. Ilia kunfandiĝo, formanta la projekton L. Cogen,

ILIN KUNIGAS ĈIUJN.

Rimarku: 1^o) la 365^{an} jaran tagon, dediĉitan al la Laborfestoj, kaj lokitan inter la dimanĉo 31^{an} de aprilo kaj la lundo, 1^{an} de Majo;

2^o) la supertagon lokifan inter la dimanĉo 14^{an} kaj la lundo, 15^{an} de Aŭgusto (Ĉieliro de Mario), io kio produktas, ĉiukvarjare, tri ripoztagojn intersekvantajn, meze en la bela sezono (almenaŭ en la Norda duonsfero).

La projekto L. Cogen estus enkondukebla « sen puŝo », en 1926^a. Efektive, ĉi-tiu jaro komenciĝas je vendredo, kaj, krome, la monatoj januaro, februaro (ĝis la 28^a entene), septembro, oktobro, novembro kaj decembro (escepte la 31^{an}), de ses monatoj, estas absolute similaj en tiu projekto kaj en la Gregoria Kalendaro.

Por pristudi funde la demandon de la plibonigo de l'Kalendaro, oni legu la jenajn verkojn: « La Réforme du Calendrier », de Armand Baar (ĉe Desoer, eldonisto, Liĝo, Belgujo), kaj « La question du Calendrier » de Chauve-Bertrand (ĉe « La Renaissance du livre, 78 Boulevard St Michel, Parizo, Francujo).